MARTO 2006

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

# La Espero

2006:2

# Komuna kongreso de svedaj kaj danaj esperantistoj

## Gemensam kongress för svenska och danska esperantister




Foto: Oresundsbron © Jan-Erik Andersson - Malmö Turism



Kvarnby popola altlernejo. Fotis: Karin Lindquist

En 2006 Sveda Esperanto-Federacio kaj Klubo Esperantista de Malmö (KEM) 100-jariĝos! Por festi tion ni invitas la svedajn esperantistojn kongresi en Malmö.

Ni ĝojas ke ankaŭ Dana Esperanto Asocio akceptis okazigi sian jarkongreson kune kun ni. Espereble estos multe da fruktodonaj kontaktoj inter svedoj kaj danoj!

År 2006 fyller Svenska Esperantoförbundet och Malmö Esperantoklubb 100 år. För att fira detta inbjuder vi de svenska esperantisterana till kongress i Malmö.

Vi är också glada över att Danska Esperantoförbundet har tackat ja till att anordna sin kongress tillsammans med oss. Förhoppningsvis kommer det att vara många givande kontakter mellan svenskar och danskar.

## LA ESPERO

***Organ för Svenska Esperantoförbundet***
ISSN 0014–0694
Monato 2006 • 94-a jarkolekto
Fondita en 1913

**Redaktion:** Leif Nordenstorm

**Frågor om prenumeration o. dyl.:**
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08–34 08 00

**E-post:** *esperanto@glocalnet.net*

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

**Tryck:** Al-fab-eto, Skövde

**Prenumeration 2006:** 200 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12–3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08–34 08 00

**E-post:** *sef@esperanto.se*
**Nätsida:** *www.esperanto.se*

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 2006:**
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**Telefon:** 08 – 34 08 00

**E-post:** eldona@telia.com

**Postgiro:** 578–5

**Nätsida:** www.algonet.se/~eldona/

**Telefontid:** Samma som Esperanto-Centro Stockholm. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Styrelsens ordförande:** Anita Dagmarsdotter

### Manus till La Espero


**sänds till Leif Nordenstorm**
**Järnvägsgränd 11**
**961 76 Boden**
***tel.* 0921-123 54**
***e-post:* esperanto@glocalnet.net**

| | Stoppdatum | Utkommer senast |
|---|---|---|
| Nr 1 | 15 januari | 15 februari |
| Nr 2 | 28 februari | 30 mars |
| Nr 3 | 30 april | 31 maj |
| Nr 4 | 15 augusti | 15 september |
| Nr 5 | 30 september | 31 oktober |
| Nr 6 | 31 oktober | 30 november |

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

# Sten Svenonius



*Kie vi naskiĝis?*
Mi naskiĝis en Kalmar en 1948, sed vivis kiel knabo en Borås.

*Kie vi loĝas?*
De preskaŭ 50 jaroj mi loĝas en Malmö, tamen mia koro restis en Vestrogotio, kie mi havas somerdomon kaj tre ŝatas esti.

*Pri kio vi laboras?*
Profesie mi estas ekonomiĉefo en Kvarnby popolaltlernejo. En nia lernejo okazos la dan-sveda kongreso inter 25-28 de majo ĉi-jare okaze de la 100-jariĝo de SEF kaj la klubo en Malmö.

*Kiujn interesojn vi havas krom Esperanton?*
Multaj aferoj interesas min. La ekesto kaj evoluo de la mondĉio. Ĉu ni estas solaj en la universo? Sed ankaŭ aliaj aferoj kiel muziko, danco, ŝako, lingvoj, naturo kaj longaj promenoj en ĝi. Nun mi vivas tre feliĉan vivon kun mia 16-jara filino Jasmin. Ŝi, same kiel mia filo Johan, 20, kaj Nora Mirinda, 13, estas denaskaj esperantistoj.

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*
Tute hazarde mi renkontiĝis kun Esperanto en 1974 kaj tre ekplaĉis al mi la ideo kaj kun granda intereso mi ekstudis la lingvon.

En Klubo Esperantista de Malmö mi havis diversajn okupojn, i. a. prezidanto 1981-1991 kaj denove ekde 1998. Inter 1987-1998 mi respondecis pri Radio Esperanto en la proksimradio de Malmö kun ĉiusemajnaj programoj. Krome mi gvidis multajn kursojn pri Esperanto ekde 1975. Por mi estas tre grava la kunlaboro inter skaniaj kaj danaj kluboj en Sunda Esperanto Agado, SEA, por kies kreiĝo mi multe agadis.

Momente mi laboras por la 100-jara jubilea kongreso kiel prezidanto de la loka komitato kaj mi esperas ke estos sukcesa kongreso kaj agrabla travivaĵo por ĝiaj partoprenantoj!

Skribe intervjuis: **Leif Nordenstorm**

---

Estimataj samideanoj!

Denove venas nova numero de La Espero. Tiu ĉi numero venas aparte fruo, almenaŭ laŭ niaj planoj, ĉar ni devas diskonigi informojn pri nia jubilea kongreso, kiu okazos en Majo. Legu pri ĝi maldekstre.

Ĉar mi laboris iom rapide pri la revuo, povas enesti preseraroj. Oni tamen konsciu ke estas pli grave ke revuo alvenas akurate, ol ke ĝi estas senerara. Ĉu ne?

Se vi ne trovas ĉion pri la kongreso en la revuo, eble vi trovos ĝin en interreto, www.agado.net Interreto fakte estas ege grava por Esperanto, ĉar ni esperantistoj loĝas dise en la mondo.

**Via redaktoro**

# Bonvenon al la centjara jubilea kongreso en Malmö 25-28 majo 2006!

## Komuna kongreso de svedaj kaj danaj esperantistoj

En 2006 Sveda Esperanto-Federacio kaj Klubo Esperantista de Malmö (KEM) 100-jariĝos! Por festi tion ni invitas la svedajn esperantistojn kongresi en Malmö.

Ni ĝojas ke ankaŭ Dana Esperanto Asocio akceptis okazigi sian jarkongreson kune kun ni. Espereble estos multe da fruktodonaj kontaktoj inter svedoj kaj danoj!

### Malmö

Malmö estas rapide kreskanta urbo en la Sunda regiono. En la lastaj jaroj konstruiĝis la ponto inter Malmö kaj Kopenhago kaj Turning Torso estas unika konstruaĵo videbla preskaŭ de ĉie en la urbo. Fama estas ankaŭ Bo01 kun sia moderna arkitekturo ĉe la maro. Belegaj estas la grandaj parkoj kaj kun plezuro ni invitas vin al nia bela urbo en eble la plej bela tempo de la jaro.

### Programo

**Ĵaude 25 de Majo**

| Horo | |
|---|---|
| 15.00 | Dokumentoj haveblas en kongresejo |
| 15.30-17.00 | Malfermita domo de KEM |
| 18.00- | Interkona vespero – i a filmo pri la UK 1948, muzika distraĵo |

**Vendrede 26 de Majo**

| | |
|---|---|
| 09.00 | Estraro de SEF (nepublika) |
| 10.00 | Jarkunsido de ILEI |
| 11.00 | Junularo SEJO kaj DEJO |
| 12.00-13.30 | Lunĉo |
| 14.00-17.00 | Inaŭguro – Salutparoladoj, muziko festprelego Seán " Rian |
| 18.30 | Komuna supeo |
| 20.00 | Eta danckurso |
| 21.00 | Koncerto, publika por la urbanoj La perdita generacio/Handzlik |

**Sabate 27 de Majo**

| | |
|---|---|
| 09.00-12.00 | Jarkunveno SEF, DEA |
| 12.00-13.30 | Lunĉo |
| 13.30-15.00 | Prelego – kongresa temo, G Hanzlik |
| 15.30-17.30 | Ekskurso per pramo Rundan sur la kanalo de Malmö |
| 19.00 | Komuna supeo |
| 20.30 | Muziko, eta danckurso |
| 21.00 | Koncerto, publika por la urbanoj La perdita generacio/Handzlik |

**Dimanĉe 28 de Majo**

| | |
|---|---|
| 08.30 | Jarkunsido Eldona Societo |
| 08.30-9.30 | KELI, Diservo en Pauli preĝejo |
| 09.30-12.30 | Prelego – kongresa temo P Jegorovas |
| 12.30 | ĝisrevida lunĉo |
| 13.30 | Postkongreso en Kopenhago |

La programo estas provizora kaj ŝanĝoj povas okazi. Alternativaj programoj estos promenoj en Malmö kaj ludo de petanko. Ĉiuj manĝoj okazos en la kongresejo kaj nia kuiristo, Peter Bankhom, estas konata pro siaj bongustaj manĝaĵoj.

### Kongreso dum 4 tagoj

La kongreso komenciĝos ĵaude la 25an de majo posttagmeze per vizito en la ejo de Klubo Esperantista de Malmö (KEM) kaj interkona vespero en la kongresejo, la Popolaltlernejo Kvarnby. Dimanĉe la 28an de majo la kongreso tradicie finiĝos post la ĝisrevida lunĉo, sed estos ebleco fari postkongresan viziton en Kopenhago samtage.

### Kongresaj ejoj

La kongreso okazos en Popolaltlernejo Kvarnby, sufiĉe proksime al la centro de la urbo. Je kelkminuta promena distanco vi trovos Jörgen Kocksgymnasiet kaj la preĝejo Sankt Pauli, lokoj por la inaŭguro kaj diservo.

### Kongresa temo

La temo estos "Lingvaj problemoj en EU" kaj ĝin pritraktos kompetentaj esperantistoj: Seán Riain, Irlando, Povilas Jegorovas, Litovio kaj Georgo Handzlik, Pollando kiu krome distros per muziko.

### Distraĵo

Koncertoj okazos kun La perdita generacio, oficiale malfermita ankaŭ por la Malmöanoj. Muzikos ankaŭ Georgo Handzlik. Kim Henriksen dancigos nin post la festmanĝoj.

### Tranoktado

La partoprenantoj mem mendas sian hotelon. Ni rekomendas Quality Hotel, kiu situas apud la koncerta domo je 15-minuta promeno de la kongresejo, telefono 040-6646000. Indikante "Esperanto-kongress" vi ricevos rabaton.

Rigardu www.agado.net por aliaj pli malmultekostaj alternativoj, precipe por la unua nokto!

Alian hotelon vi povos mendi telefone 040-341200 aŭ rete www.malmo.se/hotell aŭ www.metrotravel.se.

Gejunuloj povos senkoste tranokti en la kongresejo kun propra dormosako! Svedlingve vi trovos ĉi-numere nian proponon pri tranoktado.

### Aliĝo

Svedoj aliĝas al la kongreso pleniganте la aliĝilon. Se vi tion faros plej malfrue la 31an de marto la kotizo estos malpli alta. Danoj aliĝas kaj pagas al DEA.

### Kiel vojaĝi en Malmö

Per autobuso nr 7 vi povas iri de la Centra stacio ĝis Värnhemstorget, de kie eblas dum 10 minutoj promeni al la kongresejo. Ĉe la lasta haltejo de tiu autobuso situas la klubejo de KEM.

Mapon kaj proponitajn taksiojn vi vidos en www.agado.net.

### Kongreso por la publiko

Por kiel eble plej multe reklami la kongreson ni turnas nin al la publiko en ĉiuj kvar tagoj. Do, la interkona vespero, la danckursetoj, koncertoj kaj diservo estos malfermitaj al la Malmöanoj.

Nia kunlaboro kun la urbo estis sukcesa. En www.malmo.se vi povos legi pri Malmö en esperanto kaj ricevi informojn pri la kongreso.

### Pliaj informoj

En la retpaĝo de Sunda Esperanto Agado (SEA) ni planas daŭre aktualigi novaĵojn pri la kongreso kaj estas aliĝilo ricevebla: www.agado.net.

Informojn vi ankaŭ povas ricevi de la kongresa sekretario Karin Lindquist, tel 040-980120 au karin-lindquist@telia.com.

La klubo kaj ĝia diligenta kongresa komitato atendas vian partoprenon!

Koran bonvenon al Malmö!

**Sten Svenonius**
Prezidanto de KEM kaj
de la kongresa komitato

## Kallelse till årsmöte för SEF

Härmed kallas till årsmöte för Svenska Esperantoförbundet. Mötet kommer att äga rum den 27 maj 2006 kl 09:00 i samband med årskongressen i Malmö på Kvarnby folkhögskola. Sedvanliga förhandlingar enligt stadgarna. Motioner till årsmötet ska inkomma till styrelsen senast 27 mars (enligt stadgarna).

### Fonder

Till förbundets förfogande finns några fonder med huvudsaklig inriktning att utbilda i och informera om Esperanto. Utförligare information om dessa fonder har funnits i tidigare nummer av La Espero eller kan fås genom styrelsen. Ansökan om bidrag från dessa fonder ska tillställas styrelsen.

**Bengt Olof Åradsson**
Ordförande

Kallelse till årsstämma
Förlagsföreningen Esperanto upa

Söndag 28 maj 2005 kl 8:30
Kvarnby folkhögskola, Industrigatan 4, 3:e våningen,Malmö.
Sedvvanliga årsmötesförhandlingar.
Är du inte andelsägare? Köp då andel. En tia räcker, men varför inte betala in några, till plusgiro 578-5 nu.
Anita Dagmarsdotter, ordförande

## Kongress i Malmö 25-28/5 2006
## Föreslagen övernattning

Hotell (på promenadavstånd från kongressen)

**Quality Hotel,** Amiralsgatan 19 vid Konserthuset, tel 040-664 60 00, "esperanto-kongress" uppges vid beställning.

| | To-fr 25/5 | Fr-lö 26/5 | Lö-sö 27/5 |
|---|---|---|---|
| Enkel | 1.160 kr | 450 kr | 450 kr |
| Dubbel | 1.430 kr | 650 kr | 650 kr |

Möjlighet till extrasäng för 180 kr/natt, frukost ingår.

**Formule 1,** Lundavägen 28, tel 040-930580 kl 7-12 och 17-21www.hotel/formule1.com
330 kr per rum och natt. (För 1-3 personer är totalkostnaden 330 kr). Frukost tillkommer för 35 kr.

**Cityroom & Apartments,** Amiralsgatan 12, tel 040-795 94 cityroom@telia.com, www.cityroom.se
Enkelrum 375 kr , fler i rummen 275 kr/person (beställning 2-3 månader i förväg) Kök, WC, dusch delas av flera. Frukost tillagar man själv.

**Alternativ:** Hotellbokning i Malmö tel 040-341200 www.malmo.se/hotellbokning
eller tel 077-4474700 www.metrotravel.se.

Vandrarhem (ligger ej inom gångavstånd)
**Vandrarhemmet Villa Hilleröd,** Ängdalavägen 38, tel 040-265626, www.villahillerod.se, 190-245 kr/bädd, 100 kr/extrasäng.
**STF,** Backavägen 18, tel 040-82220 ,130-340 kr/natt (tillägg ej medlem 45 kr)

# TRA LA LANDO

## Skövde instruas tutmonde

Dum jarkunveno de Skövde Esperanto-klubo la tuta estraro reelektiĝis: Karl-Gustaf Gustafsson, prezidanto; Kurt Frisk, vicprezidanto; Solveig Bertilsson, Börje Andersson, Carl-Erik Ohlsson, Hilgon Frisk kaj Rune Andersson.

Kurt Rohdin, 99-jara, nun en junio, volis rezigni kiel revizoro post multjara ago en tiu posteno. Kiel revizoroj elektiĝis Lars Westman kaj Birgitta Anevik.

En la jarraporto oni povis legi ke la klubo nun havas 25 membrojn. Karl-Gustaf Gustafsson per la komputila reto organizis distanc-instruadon kun 80-90 el la tuta mondo.

Carl-Erik kaj Solveig denove faris grandan laboron por La Espero: ili organizis presadon kaj distribuadon.

**Börje Andersson**

## Informa Servo

En EsperantoDomo en Lesjöfors kolektiĝis en januari deko da esperantistoj por plani informan servon por havigi informojn al svedaj gazetoj kaj aliaj amaskomunikiloj. Ni esperos povi prezenti la planojn en estona numero de La Espero.

# KALENDARO 2006

25-28. majo **Sved-dana Esperanto-kongreso en Malmö.**
3-21. junio **37-a Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK),** Brattleboro, Vermonto.
26 junio-30. junio. **Internaciaj Someraj Kursoj de Esperanto** en Lesjöfors. Inf: Esperanto-domo, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. 0590-30909, egarden@esperanto.se (Samtempe seminario por spertaj esperantistoj.)
1-8 julio. **Ekoturisma Seminario** (EKOTUR 2006), Dobrichovice (apud Prago),Ĉeĥio. www.kava-pech.cz/ekotur. KAVA-PECH, Anglická 878, CZ 252 29 Dobrichovice. www.kava-pech.cz. EKOTUR 2006 estos tiamaniere organizata, ke la belecon de la regiono ĉe la rivero Berounka povos ĝui kaj biciklantaj kaj piedirantaj ekoturistoj.
3-7. julio **Esperanto-kursoj** (elementaj kaj progresantaj) Heinävesi, eafsekretario@esperanto.fi
4-8. julio **42-a Baltlandaj Esperanto Tagoj** en Kuressaare, Estonio. +372-6035272; esperant@hot.ee
22-27 julio. **4-a Balta Esperanto-Forumo.** La ĉefa temo estas Zamenhof kaj la nuntempo. www.esperanto.org /Ondo/Bef/Bef4.htm. Kontaktadreso: 1. Elzbieta Karczewska: ul. Waszyngtona 14 B m 119, PL 15-269 Bialystok, Pollando (pri aliĝado kaj lokaj aferoj) 2. La Ondo de Esperanto: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando (pri la programo). sezonojgazinter.net
25-29 julio **39-a ILEI konferenco** en Parma, Italio.
29 julio-5. aŭgusto **91-a Universala Kongreso de Esperanto,** en Firenze. fei@esperanto.it, www.ukflorenco2006.it
29 julio-5 aŭgusto **37-a Internacia Infana Kongreseto,** IIK 2006 en Prato, Italio. bert.schumann@free.fr
6-13 aŭgusto **62-a Internacia Junulara Kongreso**en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino. hara@ikso.net
6-12 aŭgusto. **1-a Internacia somera renkontiĝo:** Inter karsto kaj maro. Turisma aranĝo por sportemaj esperantistoj el la tuta mondo. ESPERANTO TRIESTE, C.P.601 , 34100 TRIESTE CENTRO - ITALIO. Retadreso: noredv@tele2.it aŭ testudo@adriacom.it
13-20 aŭgusto. **IJS en Makó, Hungario.** Celgrupo: junuloj kaj ĉiuj kiuj sentas sin junaj. http://www.ijs.hu
20-28 aŭgusto. **MELA. MEmzorga LAg-umado,** 35 km sude de Budapest, en piedira distanco de la stacidomo Délegyháza. Kontaktadreso: Andi Münchow, Oberstr. 15, D-30167 Hannover, Germanio. tel. +49-(0)511-7000011
12-16 septembro. **7-a Baltmara turisma renkontiĝo.** Negast ĉe Stralsund, Germanio. Kontaktadreso: Gunter Ebert, Straŝe am Sund 1, 18445 Kramerhof, Tel.: +49 3831 490003. Retadreso:Gun.Ebt-online.de

**www.eventoj.hu** kaj aliaj

# SEJU

## SEJUs årsmöte

SEJU kommer att hålla årsmöte under kongressen i Malmö. Mer information kommer på maillistan och på vår hemsida (www.esperanto.se/seju)

## Sök Märthastipendiet

Märtha Andréassons stipendium delas ut till stöd för resor till esperantoarrangemang. Ansökan ska vara SEJU tillhanda senast den 31:e mars. Villkor och ansökningsformulär finns på www.tejo.org/seju/martha.shtml.

**Magnus Henoch**
Ordförande för SEJU

## Internationella sommarkurser i esperanto på olika nivåer:

* barn
* nybörjare
* fortsättningskurs

26-30 juni 2006

Information lämnas av:
EsperantoGården,
SE-680 96 Lesjöfors.
0590-30909
egarden@esperanto.se

## Aliĝilo por la jubilea kongreso en Malmö 25-28 de Majo 2006 Komuna kongreso de SEF kaj DEA

Mi aliĝas (prefere plej malfrue 12 de Majo) al la kongreso kaj mendas jenon. La aliĝo validas nur post plena pago. (Danoj aliĝas al DEA)

Svedaj kronoj

**Aliĝkotizo**

| | Membro de SEF | Ne membro |
|---|---|---|
| Plej laste la 31/3 2006 | 200 | 300 |
| Ekde la 1/4 2006 | 300 | 400 |

**Manĝoj**

| | |
|---|---|
| Ĵaude 25/5 | |
| Vespere,Interkona vespero kafo/kuko | 15 |
| Vendrede 26/5 | |
| 10.00 Jarkunvenoj, kafo/kuko | 15 |
| 12-13.30 Lunĉo | 50 |
| 18.30 Komuna supeo | 70 |
| Sabate 27/5 | |
| 10.00 Jarkunsidoj, kafo/kuko | 15 |
| 12.30-13.45 Lunĉo | 50 |
| 15.30 Ekskurso kun Rundan kafo/kuko | 15 |
| 19.00 Komuna supeo | 70 |
| Dimanĉe 28/5 | |
| 10.30 Kongresa temo kafo/kuko | 15 |
| 12.30 Ĝisrevida lunĉo | 50 |
| Sumo por ĉiuj manĝoj | 365 |

Elektu kion vi deziras manĝi kaj notu.
Mi deziras vegetare manĝi: Jes/ne
Aliaj deziroj pri manĝo:

**Ekskurso**
Sabate 27/5, 15.30. Unuhora vojaĝo sur la kanaloj per la pramo "Rundan". 60
Sumo por la tuta kongreso, pagenda al pg 38714-2 Malmö Esperanto-förening.

Dato
Nomo
Adreso
Urbo
Telefono/retpoŝto

Sendu la aliĝilon al Karin Lindquist, Sergels v 14 A, 217 57 MALMÖ. Prefere uzu la tutpaĝan aliĝilon, kiun ni aldonas al tiu ĉi numero de La Espero.

## Skandinava Esperantologia Seminario (SkES) 2006 en Lesjöfors

Esperanto-Gastejo 60 Norde (EG) kaj Kultura Centro Esperantista en Svislando (KCE), kadre de la fortikigado de la aktiva Esperantistaro, organizos Skandinavan Esperantologian Seminarion (SkES) en Leŝefoŝo, Svedujo, 26-30 de junio 2006.

La Skandinava Esperantologia Seminario celas profundigi ĉe la partoprenantoj la lingvajn konojn, vastigi ilian Esperanto-kulturon (historie, literature, muzike) kaj enkonduki ilin al formado kiel kadroj je la servo de la Esperanto-popolo (didaktiko, redaktado, organizo). La lingvonivelo respondos al C1 kaj parte al C2 kadre de la Lingvotesta Sistemo de la Esperanta Civito.

La seminario komenciĝos en la hejmo de ĉiu partoprenonto, per la studado de materialo kiun ĉiu ricevos individue. La fina semajno okazos en EG, meze inter Stokholmo kaj Oslo, samtempe kun la ĉiujaraj Someraj Kursoj. Ideala nombro da partoprenantoj: 15. Tial okazos selekto inter la kandidatoj.

Starto de la perkoresponda prepara kurso: 1-an de marto 2006.

Gvidanto de la seminario: prof. Giorgio Silfer, rektoro de la Esperantologia Fakultato de KCE.

Starto de Skandinava Esperantologia Seminario lundon la 26-an de junio 2006 je la 10.00 horo. Alveno dimanĉon la 25-an de junio. Kvin studperiodoj ĉiutage , po 1 horo 15 minutoj.

Kostoj por plenkreskulo:

Lito en 1-lita ĉambro 4.290 SEK (svedajn kronojn), en 2-lita ĉambro 3.370 SEK, en 3-lita ĉambro 2.870 SEK, en 4-lita ĉambro 2.570 SEK, en 6- au 8-lita ĉambro 2.250 SEK. Lito en ĉambro kun privata necesejo: aldona pago 200 SEK (nur ses tiaj ĉambroj haveblas). Tendumado (per propra tendo) po 1.850 SEK persone.

La prezoj inkluzivas kaj la seminarion kaj manĝojn (matenan, tagan kaj vesperan) ekde lunda mateno ĝis sabata tagmanĝo. Lit- kaj mantukoj por lui, 60 SEK. Tendumado kun tagmanĝoj sed sen matenmanĝoj nek vespermanghoj po 1 300 SEK persone. Eventualaj kromaj pagoj por ekskursoj kaj libroj.

Paginto antaŭ la 10-a de junio 2006 ricevos rabaton de 500 SEK . Pagu: el Svedujo al la poŝta konto (Plusgiro) 98 90 65 – 8, aŭ al banka konto (Nordea) 9960 260989 0658. **El eksterlando** al IBAN: SE37 9500 0099 6026 0989 0658, SWIFT: NDEASESS. Konton posedanto: Esperantogården i Lesjöfors ek för, speciala konto, Stiftelsevägen 1, 680 96 Lesjöfors, Svedujo.

Por aliĝi, sendu informojn pri: Nomo, adreso, telefono, Retpoŝta adreso, Naskighdato (JJ-MM-TT), Jaro de esperantiĝo, Studtitoloj: Manĝaj postuloj (sen gluteno, sen laktozo, sen viando, tute vegano ktp, alergion klarigu zorge), Ceteraj informoj. Sendu vian aliĝilon ĝis la 15-a de februaro 2006 al: Esperanto-Gården, SE -680 96 Lesjöfors, SVEDUJO. Telefone + 46 – 590 – 309 09, fakse + 46 – 590 – 303 59, rete egarden@esperanto. se

**Martin Strid**
prezidanto de Esperanto-Gården

### DEZIRAS KORESPONDI

Mi vivas en la sudo de Brazilo, en Ŝtato Rio Grande do Sul (Granda Rivero el la Sudo). Mi naskiĝis en la jaro 1965, kaj nuntempe mi estas publika funkciulo de la brazila Respubliko. Mi interesiĝas pri la homa vivo ĝenerale, do mi povas kontakti kun iu ajn. Marco Antonio Ferreira Teixeira, Tecnico Judiciario - 40-a Zona Eleitoral, Santa Cruz do Sul - RS, Brazilo.

## Interlingvistiko en pola universitato

Inter la 28a de januaro kaj la 3a de februaro okazis la dua sesio de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz por la novaj gestudentoj: 25 homoj el 12 landoj partoprenis ĝin. Malgraŭ la plenŝtopita programo, inter kiuj 4 ekzamenoj kaj la malvarma vetero, la semajno estis tre bonetosa kaj vigla.

La sekvaj kursoj okazis: enkonduko en morfologion kaj sintakson kun ekzemploj el diversaj lingvoj (Michael Farris), esperanta literaturo de la dua periodo (Lidia Ligiza kaj Tomasz Chmielik), interlingvistiko 2 (Vera Barandovská- Frank kaj Bradio Moro) kaj esperanta gramatiko 1 kun diskutigaj problemoj kiel la radikkaraktero (Ilona Koutny).

Por la merkreda vespero la grupo pretigis kulturan programon por kiu ni invitis ankaŭ la lokajn esperantistojn. Estis kantoj kaj muziko, lumbilda prezento kaj projekciado de mallonga filmo farita dum la malfermo en septembro kie la studoj kaj la gestudentoj prezentiĝas. La universitatan programon kompletigis ekskurso al Torun sabate, kie eblis rigardi la urbon kaj muzeojn kun esperantista gvidado.

**d-rino Ilona Koutny**

http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html

## Ĉe Eŭropa Lingva Konsilio

La Estraro de UEA elektis s-ron Wim Jansen, docenton pri interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo, kiel konstantan reprezentanton de UEA ĉe la Eŭropa Lingva Konsilio, kies fonda membro UEA estas. Wim Jansen lastatempe partoprenis asembleon de ELK en Bruselo nome de UEA

## Poul Thorsen (1915-2006)

La 30-an de januaro forpasis la dana Esperanto-poeto Poul Thorsen en la aĝo de 91 jaroj. Thorsen, kiu profesie estis instruisto, lernis Esperanton en 1931 kaj jam baldaŭ ekaktivis en la laborista Esperanto-movado. En 1937 li unuafoje partoprenis SAT-kongreson en Roterdamo, invitante tie al partopreno en la Kopenhaga kongreso en 1939, kiun li organizis kun Paul Neergaard.

En la 50-aj jaroj Thorsen gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA. De 1954 ĝis 1962 li gvidis la eldonejon "Koko" kaj estis kunredaktoro de la altnivela kultura-literatura revuo "Norda Prismo" de 1957 ĝis 1974. Liaj ĉefaj eldonitaj verkoj, kiujn ofte karakterizas satira humuro, estas la poemaroj "Rozoj kaj urtikoj" (1954), "Sen paraŝuto" (1963), "Gruk" (de Kumbel, 1956), "Pluk: miniaturoj" (1960); "Du el" (kun Marjorie Boulton, 1985), la rakontaro "Stokita vino" (1995), kaj la rememoroj "Babile kun mi mem" (1996).

Grandaj hobioj de Poul Thorsen estis, kiel li mem diris, "ekscesa vojaĝemo" – li vizitis pli ol 80 landojn – kaj fungoj, pri kiuj li longe ankaŭ estis fakdelegito de UEA. Membro de UEA li estis ekde 1947. En 1997 li kaj lia edzino Roma donacis al UEA grandan monsumon por starigi la kason Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kiu intertempe helpis kelkdekon da Esperanto-bibliotekoj por pliriĉigi siajn kolektojn.

## PMEG aperos sur papero

De pli ol dek jaroj la plej bona gvidilo pri la esperanta gramatiko estas la manlibro verkita de akademiano Bertilo Wennergren. Tamen ĝis nun la verko troveblis nur en la reto, kie ĝi daŭre estis perfektigata de la aŭtoro. Antaŭ la fino de la jaro la verko aperos ankaŭ libroforme.

La plej kompleta kaj ĝisdata gvidilo pri la lingvo Esperanto finfine aperos ankaŭ libroforme. Tion anoncis la aŭtoro de PoMEGo, (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko) la 2-an de novembro.

Jam de 1994 PoMEGo haveblas en la reto kaj daŭre perfektiĝadas per la persista laboro de Bertilo Wennergren, sed nur nun estis trovita eldonisto por papera versio de la manlibro.

– De proksimume dek jaroj mi ricevadas retmesaĝojn, kiuj starigas unu saman demandon: "Ĉu PMEG (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko) estas havebla ankaŭ kiel libro?" Mi ĉiam respondis pli-malpli same: "Ankoraŭ ne, sed mi laboras pri la afero...", skribas Bertilo Wennergren en sia blogo. Tamen ĉi-somere la laboro ekhavis konkretajn rezultojn.

– Mi havis dum la jaroj kontaktojn kun pluraj Esperantaj eldonejoj, sed ĉiam la intertraktado fiaskis, precipe pro manko de mono por tiel granda eldonaĵo (temas pri ĉirkaŭ 700 paĝoj). Sed ĉi-somere, kiam mi estis en Usono ĉe la NASK-kursaro kune kun Birke, mi ricevis novan oferton pri eldonado. Tiu oferto venis de ELNA (Esperanto-Ligo por Norda Ameriko), pere de Tim Westover, kiu estas la motoro de tiu iniciato. Mirinde glate kaj senprobleme iris la intertraktado. Reveninte de Usono, mi devis sufiĉe rapide kaj ŝvite plenumi la lastajn korektojn kaj realigi la definitivan konvertadon al PDF-dosiero (interalie helpe de la mirinda programo "OpenOffice.org"). Tiun PDF-dosieron mi antaŭ kelkaj tagoj sendis al Usono, kie ĝi nun troviĝas en la presejo, Bertilo Wennergren skribas.

Se ĉio iros laŭ la planoj, la papera versio de la manlibro estos aĉetebla ĉe ELNA jam antaŭ la fino de la jaro, rakontas Bertilo Wennergren en sia blogo.

**www.liberafolio.org**

## Belartaj konkursoj 2006

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA invitas partoprenantojn por la 57-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 91-a Universala Kongreso en Florenco. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj. La branĉoj estas la jenaj:

* Poezio;
* Prozo;
* Teatraĵo;
* Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la UK, "Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo";
* Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj;
* Filmo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo;
* Infanlibro de la Jaro;

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 2006.

Detala regularo legeblas ankaŭ en la TTT-ejo www.uea.org.

# Iom pri Skanio

Skanio, la plej suda provinco de Svedio, kaj parto de la regiono Skåneland. Skanio dum pluraj jarcentoj apartenis al Danio (ĝis 1658). Ĝiaj dialektoj (difineblaj kiel sud-svedaj aŭ orient-danaj, laŭplaĉe) kaj ĝia flago respegulas kaj la antaŭan danecon, kaj la nunan svedecon.

En Skanio troveblas la dua universitato de Svedio, tiu de Lund, fondita en 1666 (interalie por plirapidigi la svedigon de la provinco). La universitatoj de Lund kaj Uppsala estas same konkurencaj inter si kiel la anglaj de Cambridge kaj Oxford.

## Geografio

Skanio estas norda limiga el Svedio per la sudsveda altlando, okcidenta limiga el la Dania insulo Sjælland per la kanalego Öresund kaj suda kaj orienta limiga per la Balta maro.

Du grandaj insuloj apartenas Skanion, ambaŭ en Öresund. La norda insulo estas Hallands väderö kaj la suda insulo estas Ven.

La bordoj de Skanio estas vastegaj sablobordoj, sed la nordokcidenta bordo kie estas borderaĵa de dekaj kaj centaj altaj rokoj.


La lando estas tre ebena-malalta kaj plejparte kovrita de fekundaj terkulturkampoj kaj lumaj fagarbaroj.

## Urboj

La svedia ŝtato abolis la urbojn kiel politikajn unuojn en 1971. Tiuj Ĉi urboj estis oficialaj urboj tiam:

1. Eslöv (Ĉartis 1911, 15.000 loĝantoj)
2. Falsterbo (Ĉartis Ĉirkaŭ 1200, 7.000 loĝantoj kun Skanör)
3. Helsingborg (Ĉartis Ĉirkaŭ 1085, 88.000 loĝantoj)
4. Hässleholm (ĉartis 19??, 17.000 loĝantoj)
5. Höganäs (ĉartis 19??, 13.000 loĝantoj)
6. Kristianstad (ĉartis 1617, 35.000 loĝantoj, la urbo estas la ĉefurbo de Skanio)
7. Landskrona (ĉartis 1413, 28.000 loĝantoj)
8. Lund (ĉartis ĉirkaŭ 950, 75.000 loĝantoj)
9. Malmö (ĉartis ĉirkaŭ 1250, 260.000 loĝantoj)
10. Skanör (ĉartis ĉirkaŭ 1200, 7.000 loĝantoj kun Falsterbo)
11. Simrishamn (ĉartis ĉirkaŭ 1300, 6.000 loĝantoj)
12. Trelleborg (ĉartis ĉirkaŭ 1200, 25.000 loĝantoj)
13. Ystad (ĉartis ĉirkaŭ 1200, 17.000 loĝantoj)
14. Ängelholm (ĉartis 1516-1547 kaj 1767, 22.000 loĝantoj)

*Turning Torso estas unika konstruaĵo videbla preskaŭ de ĉie en la urbo. Fotis: Karin Lindquist.*



## Malgranda historio

* Ĝis ĉirkaŭ 800: Memstara reĝlando en la Dania konfederacio.

* Ĉirkaŭ 800-1658: Ĉeflando en la Dania reĝlando.

* 1658-1720: Eksterprovinco de Svedio. Multaj militoj, ribeloj kaj maltrankviloj.

* Ĉirkaŭ 1300-1709: Konstantaj militoj inter Danio kaj Svedio. Skanio invadiĝadis dum ĉiuj generacioj de Svediaj armeoj.

* 1658-1900: Svedia naciigo.

* 1720-1999: Svedia limoprovinco.

* 1999-2010: Provo kun limigita memregado ene de Svedio.

Areo: 11 027 km2
Enloĝantoj:
- loĝantaro (2004): 1 159 397
- popolodenseco: proksime 100 loĝantoj/km2

Floro de regiono: Lekanto
Besto de regiono: Reĝa cervo
Fiŝo de regiono: Angilo
Fungode regiono: Kampoŝampinjono
Ŝtono de regiono: Siliko
Naciokanto:Vackra hembygd, du som vilar (Bela hejma regiono, kiu ripozas)
Politika sistemo: Limigita memregado ene de Svedio
Ĉefurbo: Kristianstad

Citita el
**http://eo.wikipedia.org/wiki/Skanio**

# Biblioteko bezonas librojn

**Ĉu vi povas kontribui?**

Tagoj antaŭ mia forveturo al mallonga ferio en Egiptio, mi pripensis la programerojn: en Kairo, la piramidoj kaj la Sfinkso. Kaj la egiptia muzeo. En Aleksandrio? La banstrandon, se vetero permesas. Kaj la Bibliotekon mi certe vizitos!

Jes ja, mi kontrolos se ankaŭ estas esperantolibroj.

En Aleksandrio estis unu el la plej unuaj akademiaj institucioj en la mondo, nome la Biblioteko, fondita antaŭ pli ol tri mil tri cent jaroj. Oni strebis kaj preskaŭ sukcesis kolekti ekzempleron de ĉiuj libroj en la mondo. Poste la tuta biblioteko estis forbruligita.

En la 1990-aj jaroj, laŭ propono de la Aleksandria Universitato, oni ekkonstruis novan Aleksandrian Bibliotekon, kie renkontas kulturoj de la mondo.

## Kion fari?

Telefonis al mi Lennart Svensson de Lesjöfors, kaj mi ion diris pri mia baldaŭa ferio. Sed – se ne estas esperantolibroj en internacia renkontejo de kulturoj? Kion fari? Se ne estas, devus ekesti!

Ni interkonsentis ke mi portu esperntolibron tien. Se jam estas, nu bone. Se ne, esperantistoj povus plibonigi la aferon.

Ne estis tempo kolekti monon nek mendi librojn. Sed estis tute klare inter Lennart kaj mi, ke ni nek povas nek volas persone doni esperantolibraron al la Aleksandria Biblioteko.

Ni simple decidis prunti taŭgan libron kaj doni ĝin.

## Nekonata lingvo

Alveninte en Aleksandrio mi aranĝas renkonto kun ĉefo de la Biblioteko.

Nia internacia lingvo estas ege malvaste konata en arabaj landoj kaj estis tute nekonta en la Biblioteko, kiam mi vizitis ĝin en januaro. La juna ĉefbibliotekistino kun surprizo kaj granda ĝojo akceptis ekzempleron de la Nobla Korano, en esperanto kaj en la araba. Nomojn de lertaj islamistoj kiuj realigis la eldonon de la Korano ŝi jam konis, kaj tiu fakto kaj la subteno de Unesko garantiis al ŝi la kvaliton de la eldono. Mi donacis

*Daŭrigo en paĝo 8.*

# Informe kaj amuze pri pramondo

**LIBROSERVOJ**

Librojn oni povas mendi ekzemple per la retpaĝo www.uea.org Klaku je "Katalogo".

Librojn eldonitajn de la sveda Eldona Societo Esperanto oni mendas per la retpaĝo www.esperanto.se/eldona aŭ www.algonet.se/~eldona/
Tie vi trovas ekzemple la tute novan libron "La Frakseno Igdrasilo".

***Alf Henrikson & Edward Lindahl. La frakseno Igdrasilo. El la sveda tradukis Bertil Nilsson. 138 p. Eldona Societo Esperanto. Stokholmo, 2005.***




Ĉu vi scias, ke, antaŭ ol la tero fariĝis ronda, troviĝis en la universo nur unu grandega arbo, kies folioj montris ke ĝi estis frakseno?

Niaj nordiaj prapatroj sciis, kaj en islandaj manuskriptoj ili notis siajn sciojn pri tiu arbo, kiu havis individuan nomon: Igdrasilo. Alf Henrikson, brila sveda ĵurnalisto kaj popularscienca verkisto, kolektis la rakontojn pri tiu pramondo en tiu ĉi libro, kaj Bertil Nilsson, same brila esperantista tradukisto, esperantigis ĝin por ke la verda popolo, diasporita ĉirkaŭ la hodiaŭa mondo, povu informiĝi pri ĝi.. Ni dankas al ambaŭ, sed nia danko direktiĝu ankaŭ al la ilustrinto Edward Lindahl, desegnisto kaj skulptisto. Ĉar en tiu ĉi libro la desegnaĵoj (ofte kun humuraj trajtoj) intermiksiĝas kaj interagas kun la teksto (la formato estas malavara: 23 x 20 cm); jen la teksto dominas la paĝon, jen la desegnoj flankenbalaas ĝin tiel ke nur malmultaj linioj trovas lokon. Kiam monstroj aperas aŭ ŝtormoj furiozas, la teksto eĉ tute mutas.

Kiel skrupula ĵurnalisto Alf Henrikson akurate informas pri la strukturo de la arbo. Montriĝas ke ĝiaj branĉoj estis loĝataj sur tri niveloj, kiuj tre malofte havis komunikon unu kun alia. Plej supre troviĝis Valhalo, la "ĉielo" de la tiamaj dioj, la azoj (svede: asar).

Meze situis la mondo de la homoj, Midgordo (svede: Midgård). Sube oni trovis Hel, la subtero, kie laŭdire la mortintoj kolektiĝis. Ni ne forgesu, ke gigantoj vivis sur ekstremoj de la branĉoj. Se vi volas scii kie troviĝis nanoj kaj elfoj, legu la libron!

Kompreneble neniu el tiuj kategorioj sciis, ke ili loĝas en arbo. Tiu ja estis "granda granda": la distancoj inter la branĉoj estis milionmejlaj.

Tamen la priskribo de la frakseno ne okupas grandan parton de la teksto. Henrikson rakontas pri elstaraj okazaĵoj sur la diversaj niveloj: la kreo de Askur kaj Embla, la unuaj homoj; la edziĝo de la plej potenca azo, Odin, kun Frigg; la invento de la runoj kaj de la tagoj kaj monatoj (ankoraŭ hodiaŭ la tagoj mardo, merkredo , ĵaŭdo kaj vendredo estas en la sveda nomataj laŭ azoj: tisdag laŭ Tir, onsdag laŭ Odin, torsdag laŭ Tor, fredag laŭ Frigg). Dekkelk paĝoj estas dediĉitaj al la ĉasado al la Fenris-lupo, fibesto danĝera pro sia eksternorma kreskopovo. Grandiozan finon faras la falo de la frakseno = la pereo de la mondo = Ragnaroko. Nia nuna mondo estas nur fraksena splito kiu kreis sian orbiton en la malplena spaco.

Tamen brilas espero en la lastaj linioj de la libro: ni informiĝas ke la nornoj (diinoj de la sorto) plantis novan fraksenon, kiu certe ankoraŭ nur estas mejlon alta sed kreskas konstante. Do, post mil jaroj ni povos translokiĝi tien?

La stilo de Bertil Nilsson estas altgrade leginda. Laŭ mi, li tre bone trafis la gemutan tonon de Henrikson, kreante agrablan legaĵon (kiun oni tre bone povas uzi popece, ĉar la rakontoj estas mallongaj). Certe ne estis necese kvazaŭ pardonpeti ĉar li "uzis kelkajn vortojn kiujn vi eble ne aŭdis aŭ vidis antaŭe". La listo de neologismoj estas tre mallonga; mi volas atentigi pri domestigi = malsovaĝigi, kongeli = frostigi (manĝaĵon), ubero = mamo de mamulo. – La konstruo "estis okupata transdoni..." (p.15) ŝajnas al mi mankhava. Sur p. 34 "trans la sojlo" mi preferus "sojlon". - Troviĝas nomlisto esperanta-islanda, sed ankaŭ paĝidikoj estus dezirindaj.

Ĉiuj nordlandanoj ricevas en la lernejo almenaŭ kelkajn informojn pri la pranorda mitologio. Multaj el ties nomoj estas ĝenerale konataj. Tamen mi estas certa ke apenaŭ iu ricevis tiel ampleksan kaj amuzan panoramon de la aza mondo kiel kreis Henrikson-Lindahl. Por ne-nordlandanoj, kiuj eble nur scias pri la vikingoj, la libro povas, en certa senco, malfermi pordon al nova (sed antikva!) mondo.

**Ebbe Vilborg**

## Biblioteko bezonas librojn

*Daŭrigo de paĝo 7.*

la libron nome de nordiaj esperantistoj.

Tiu ĉi grava internacia kulturcentro bonvenigas kromajn esperantolibrojn. La ĉefo de la biblioteko eĉ klarigis al mi kiuj libroj plej gravas kaj estos bonvenigaj.

Post mia reveno hejmen estis tempo paroli kun la prezidanto de nordia organizo, nome EsperantoDomo. La kooperativo bonvole peras kolektadon de mono. Ni ja konas sufiĉe multe da svedaj kaj aliaj nordiaj esperantistoj por esti konvinkitaj ke sukcesos la donaco de gravaj esperantolibroj al la Aleksandria Biblioteko. Ĉiuj esperantistoj estas invititaj kontribui al la esperantlingva parto de ĝi.

Kontribuoj estas bonvenaj al la PlusGiro konto de Esperanto-Gården, numero 98 90 65-8, aŭ al ĝia UEA-konto lesj-q . Bv skribu Aleks sur talono. (Se vi uzas UEA-konton bv sendi ĝirilkopion al EsperantoDomo. Reviziistoj de E-G kompreneble kontrolos ankaŭ tiun ĉi konton.

Svedio ludis gravan rolon en la konstruado de la Biblioteko. En tiu kontekto indas mencii tri aferoj: estas speciala Nobel-ĉambro, kie ĉiuj Nobel-premiitoj de literaturo estas presentitaj per siaj libro; estas la infanbiblioteko, kie legis, ludis kaj designis lokaj infanoj kiam mi vizitis ĝin; kaj estas la trejnado de bibliotekistoj, kion prizorgas profesoro de Gotenburgo.

En Aleksandrio estas ankaŭ alia por svedoj interesa domo, preskaŭ palaco. Ĝi estas la Sveda Domo, eksa konsulejo, kiu donis al la sveda eklesio la tiama ĝenerala konsulo. Krom lia recidejo kaj konsulejo, en la domo ankaŭ estis la sveda marista preĝejo kiam ankoraŭ trafikis svedaj ŝipoj Aleksandrion. Por plibonigi relatoj inter Eŭropo kaj arabaj landoj EU kreis Anna Lind-instituton, kiu ankaŭ troviĝas en la "Sveda domo".

**Bengt Nordlöf**

# Aliĝilo por la jubilea kongreso en Malmö 25-28/5 2006
# Komuna kongreso de SEF kaj DEA

Mi aliĝas (prefere plej malfrue 12/5) al la kongreso kaj mendas jenon:
La aliĝo validas nur post plena pago. (Danoj aliĝas al DEA)

| | | Membro de SEF | Ne membro de SEF | Svedaj kronoj: Mi mendas kaj pagas |
|---|---|---|---|---|
| **Kotizo por partopreno** | | | | |
| Aliĝkotizo | | | | |
| Plej laste la 31/3 2006 | | 200 | 300 | |
| Ekde la 1/4 2006 | | 300 | 400 | |
| **Manĝoj** | | | | |
| Tago kaj horo | | | | |
| **Ĵaŭde 25/5** | | | | |
| Vespere | Interkona vespero, kafo/kuko | 15 | | |
| **Vendrede 26/5** | | | | |
| 10.00 | Jarkunvenoj, kafo/kuko | 15 | | |
| 12-13.30 | Lunĉo | 50 | | |
| 18.30 | Komuna supeo | 70 | | |
| **Sabate 27/5** | | | | |
| 10.00 | Jarkunsidoj, kafo/kuko | 15 | | |
| 12.30-13.45 | Lunĉo | 50 | | |
| 15.30 | Ekskurso kun Rundan, kafo/kuko | 15 | | |
| 19.00 | Komuna supeo | 70 | | |
| **Dimanĉe 28/5** | | | | |
| 10.30 | Kongresa temo, kafo/kuko | 15 | | |
| 12.30 | Ĝisrevida lunĉo | 50 | | |
| | **Sumo por ĉiuj manĝoj** | **365** | | |

Elektu kion vi deziras manĝi kaj notu en la verda kampo!

| | Jes |
|---|---|
| Mi deziras vegetare manĝi | |

Aliaj deziroj pri manĝo:

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Ekskurso** | | | |
| Sabate 27/5<br>15.30 | Unuhora vojaĝo sur la kanaloj<br>per la pramo "Rundan" | 60 | |

Sumo por la tuta kongreso, pagenda al pg 38714-2 Malmö E-förening

| | |
|---|---|
| Dato | |
| Nomo | |
| Adreso | |
| Urbo | |
| Telefono / e-poŝto | |

**Sendu la aliĝilon al Karin Lindquist, Sergels v 14 A, 217 57 MALMÖ**